



Direktoro P-o Em. PELTIER
Sainte-Radegonde ; Tours (Indre-et-Loire) France
Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur
al la Direktoro. Manuskriptoj neniam estos resendataj.

ABONEJOJ de E. K.

- FRANCLANDÓ : Ĉe la Direktoro de E. K., kaj ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris V^e.
- ANGLOLANDO : S-o O'Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.
- BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, 3, Place de l'Université, LOUVAIN.
- BOHEMUJO-AŬSTRIO : F. Topič, libr. Ferdinandova 9. Praha.
- ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679, SANTIAGO-CHILI.
- HUNGARLANDO S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO. —
- ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, S. QUIRICO DI PORDENONE (*Udine*).
- HISPANLANDO S-o Ant Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.
- GERMANLANDO : Moller et Borel, 95, Prinzenstr. Berlin.
- POLUJO : Arct. libr. Nowy Swiat, 53, Warszawia.
- RUSLANDO Societo Espero, Bol. Podjačeskaja, 24, log. 12. S. Peterburgo.

Ciuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responde nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro.

PRESEJO A. BARBOT
 15, Rue Etienne-Pallu, 15
TOURS. (TUR') FRANCE

KONDIĈOJ DE AĤONO

Abono jara : \ En Francando : 4 frankoj. | **Unu numero :**
 Ekster — 5 fr. | 0 fr. 50, afrankite.

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro au marto. La Revuo ne aperas en agosto nek en septembro. Postmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

Anoncoj. — Tuta pago kostos 15 frankojn ; — duona pago 7 fr. 50 ; — 4^{na} pago : 4 fr. ; 8^{na} pago : 2 fr. 50 ; 16^{na} pago : 2 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj : por tri fojoj 10 % ; — por ses fojoj : 15 % ; — por 10 fojoj : 20 %

KUN SES BELAJ ILUSTRAĴOJ KATO KUN BOTOJ.

Kosto : 0 fr. 50, afrankite. Aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K. Specialaj kondiĉoj por almenaŭ *dek* ekzempleroj kune mendataj.

HO, MIA KOR : Kanto Esperantista. Poezio de D-ro Zamenhof. Muziko de S-ino Josée GUIVY. — Plej ŝatinda muzikaĵo, kantita en Boulogne, dum la Kongreso. Aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo, kaj ĉe la Direktoro de E. K. — Prezo : 1 fr.

BALDAU AĈETEBLAJ

En songo, poezio de D-ro Zamenhof, muziko de S-ino Josée Guivy 1 fr. 60

Himno, poezio de Profesoro Dombrowski, muziko de S-ino Josée Guivy 1 fr. 50

PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA.

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro).

Ĉiu jaro : 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.)

Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr.

(La tuta kolekto ĝis marto 5 fr. afrankite). **Artikoloj legindaj en la kolekto :** Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj larĝaj (E. Peltier). Greka skismo (V. E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrowski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée ; skizo ; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecioj por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj. lingvaj ; kaj informoj pri la 1-a Kongreso Esperantista. ktp. ktp.

ESPERO KATOLIKA

ENHAVO

	Paĝoj
A. DOMBROVSKI Io pri Homa Saĝmallarĝeco.....	65
LA DIREKTORO Por Unuiĝo de Kristanaro.....	71
El la manuskripto de l'Preĝaro.....	73
ELEDA KAJ VINKO La lasta Abencerago (Sekvo).....	74
Paĝo de l'Direktoro.....	79
En Esperantujo Revuo de la revuoj esperantistaj.....	80
P-RO E. LIME: Pri « Homaranismo » aŭ « Hilelismo ».....	86
Notetoj ; — Bibliografio ; — Monoferoj ; — Abonmonoj ricevitaj ; — Ŝakoj ; — k. t. p.....	90

IO PRI HOMA SAĜMALLARĜECO

ALVOKO AL HOMOJ DE BONA VOLO KAJ DE LARĜAJ RIGARDOJ

Oni multe hodiaŭ parolas kaj disputadas pri la sociala malbono kaj serĉas ĝiajn kaŭzojn. Dank' al tio ilia nombro estas jam nun tre granda, ĉar oni metas en ĝin preskaŭ ĉion : kapitalismon, militarismon, aŭtokratan despotismon, mankon de politika libereco, limigon de personaj rajtoj, malklerecon de popolaj amasoj k. t. p. k. t. p.

Iam eĉ, kiel kaŭzon de sociala malbono, oni nemalkuraĝas montradi la religion mem, precipe katolikan, pentrante ĝin, kiel la plej malamikan al civilizacia progreso.

Kompreneble, laŭ *diagnozo* de kaŭzoj estas ankaŭ proponataj la *rimedoj* por forigi la socialan malbonon.

Se oni devus kredi al la sin mem altrudantaj kuracistoj de l'nuna « sociala malsano », la homa vivo jam nun facile povus ĉie sur la tero fariĝi vere paradiza, se oni nur ekvolus tuj forigi tiun aŭ alian el la suprediritaj « malbenataj » kaŭzoj.

Ĉu tiu unuflanka kaj mallarĝa optimismo estas racia? Ni tre ĝin dubas. Ĉar ĉiuj suprediritaj kaŭzoj laŭ nia opinio, estas *nek ĉefaj, nek precipaj, nek unuagradaj*. Ili ĉiuj estas nur *eksteraj aperoj* de unu ĉefa interna kaŭzo, el kiu, kiel el fonto neelĉerpebla, elfluadas la ĉiaspeca malbonaĵo en nia sociata kaj internacia vivo.

En kio do konsistas tiu ĉi kaŭzo?

Ĝi konsistas en tio, ke la homa saĝo kaj koro tre ofte estas aŭ *nature mallarĝaj*, aŭ de homo mem *kontraŭnature mallarĝigataj*. La duobla mallarĝeco de homa saĝo kaj koro : jen estas la plej granda homa malamiko kaj la plej fortika barilo de l'kristana civilizacio.

Kaj efektive, kion la plej peneme serĉas la homaro en sia historia vivo ? Ĝi serĉas nur du precipajn objektojn : *veron* kaj *bonon*, sed, bedaŭrinde, ilin trovi ne povas. Ĉar la dirita duobla mallarĝeco neniigas plej grandan parton de l' homara laboro.

Ĝi ne trovas la *plenan verajon filozofian* kaj religian, ĉar homa saĝmallarĝeco ekkreis senfinajn mallarĝajn, filozofiajn sistemojn, multobligis malverajn religiojn kaj eĉ de vera Krista Eklezio apartigis kelkajn grandajn sed malamikajn onojn.

Ĝi ankaŭ ne trovas la *plenan bonon*, ĉar la duobla dirita mallarĝeco en *ĉiuj imperioj, regnoj, respublikoj* ekkreis senfinajn partiojn kaj grupojn politikajn, sin reciproke ne komprenantajn, ĉiam batalantajn, ĉiam laŭhunde sin mordantajn kaj per tio malhelpantajn al la homaro laŭhome vivadi.

Kontraŭ la *mallarĝeco de homa koro* estas iom militantaj la religio, la edukado, la naciaj kaj familiaj tradicioj, kvankam tiu militado tre ofte restas sensukcesa. Kontraŭ do la *mallarĝeco de homa saĝo* la deva milito ankoraŭ tute ne *ekkomenciĝis*.

El tiu ĉi kaŭzo la *homa saĝmallarĝeco* reĝadas hodiaŭ en la tuta civilizita mondo, farante multe da malbono ĉie, kie ajn ĝi aperas : en religio, en filozofio, en scienco, en politiko, en sociala kaj internacia vivo. k. t. p.

Sciante tion, ni ekdecidis anonci kaj ekkomenci la *sanktan kruciron kontraŭ la homa saĝmallarĝeco* kaj invitas ĉiujn homojn de bona volo kaj de larĝaj rigardoj aliĝi al ni.

Tamen por ke nia milito sukcesu, ni devas pli bone koni nian kontraŭulon, lian forton kaj karakteron,

Por tiu-ĉi celo ni kuraĝas proponi al la klera atento de legantoj la sekvantajn konsiderojn

Antaŭ ĉio, oni neniam forgesu, ke la *grandeco* de la homa saĝo ne estas identa kun *ĝia larĝeco*. Ĉar la granda saĝo ne ĉiam estas *larĝa saĝo*, kontraŭ eĉ tre *granda saĝo* povas esti tre *mallarĝa saĝo*. Ekzemple : Darwin, Flammarijon, Tolstoj ;

en ili la vera saĝgrandeco estas kunigita kun la plej stranga saĝmallarĝeco. Dank' al tiu lasta, ili ekkoninte nur unu parteton da veraĵo, plene je ĝi kontentiĝas, nur ĝin solan ŝatas, nur ĝin solan predikas kaj per ĝi sola ĉion klarigi penadas. Tiel por Darwin ekzistas nur veraĵo evolucia, por Flammarijon — nur astronomia, por Tolstoj — nur evangelia, kaj tiu ĉi mem nur laŭtolstoje komprenata.

El ĉio ĉi al ni ŝajnas, ke la suprenomitaj tri eminentuloj ne estas veraĵaj plenaj pensistoj, sed nur iaj duon- aŭ kvaron-pensistoj.

Ĉar la veraĵaj pensistoj kun rigardoj vere larĝaj agadas tute alie. Ili esploras ne ian parteton da veraĵo, sed ĉion; ili volas kompreni ĉion, klarigi ĉion; tiam ili *forjetas nenian faktan* sen gravaj racioj kaj sen antaŭa esploro. Veraĵaj pensistoj serĉas *plenan sintezon* de homa ĉiuscienco, kiun oni povas esprimi per formulo :

$$X = R + F + S \quad (1)$$

en kiu R signifas la problemojn *religiajn*; F, la *filozofiajn*; S, la *sciencajn*, en la plej larĝa senco de tiu ĉi vorto (naturajn, socialajn, historiajn, k. a...).

Veraĵaj pensistoj penas trovi tiun grandan X, solvante la problemon (1) en ĝia tuta pleneco; por tio ili zorge kaj fervore esploras la valorojn de R, F, kaj S, pripensas iliajn reciprokajn rilatojn kaj fine serĉas ilian plenan kaj larĝan sintezon.

La pensistoj do kun mallarĝaj saĝoj sekvas tute alian metodon : anstataŭ esplori aparte la valorojn de R, F kaj S, kaj poste ilin sintezigi science, ili preferas faciligi al si la problemon per la *nuligado* de unu, ia ajn valoro, aŭ de du, aŭ eĉ de ĉiuj tri R, F kaj S kune; kompreneble la problemo (1) tiamaniere solviĝas tre facile kaj la kreado en filozofiaj sistemoj fariĝas infana ludilo. Ĉar el la formulo (1) oni tuj ricevas

$$X = 0 \quad (\text{nihilismo, skepticismo.....})$$

$$X = R \quad (\text{misticismo, panteismo.....})$$

$$X = F \quad (\text{idealismo, racionalismo.....})$$

$$X = S \quad (\text{empirismo, materialismo.....})$$

Kiam do la tuta absurdeco de tiuj unuflankaj sistemoj plene ekmontriĝas, tiam ekaperas la sistemoj kombinigitaj

$X = R + F$ (teozofio, tolstoismo,....)

$X = R + S$ (okultismo, spiritismo....)

$X = F + S$ (pozitivismo, socialismo....)

kiuj, kvankam ĉirkaŭprenas iom pli da veraĵo, tamen la vere penseman homon kontentigi ne povas, ĉar prezentas al homa saĝo la veraĵon kripligitan, ekplatigitan, ian *dudimensian*, dum la veraĵo absoluta, simile al nia spaco, povas nomiĝi *tridimensia* ĉar havas la trioblan direkton *mistere-religian, racie-filosofian, kaj positive-sciencian*.

La kreistoj de sistemoj kripligitaj kaj plataj similas al homoj ekmalposedigitaj de tiu aŭ alia sento, — al blinduloj, surduloj, aŭ mutuloj. La blindulo povas bone aŭdi, sed nenion vidas; la surduloj povas bone vidi, sed nenion aŭdas; la mutuloj povas bone vidi, aŭdi kaj vidi, sed ion diri li ne havas eblon. Io simila okazas ankaŭ kun la pensistoj malsanaj je saĝmallarĝeco. Unu el ili estas granda esploristo de l'naturro, sed ĉar li per teleskopo ne estis Dion vidinta, kaj per mikroskopo ne rimarkis la homan animon, tial li ambaŭ tiujn estaĵojn nomas « *mitojn* », kaj kuraĝe skribas, ke $R = O$! Alia, estante nekontenta je la monismo Büchnera, proponas sian propran « *psikomonisman* », elkondukitan el la sekvantaj konsideroj

« Mi prenas per mano la ŝtonon. Kion mi pri ĝi scias? Ĝi estas peza, — jen la sento; ĝi estas malvarma, — jen alia sento: ĝi estas malmola, — jen ankaŭ la sento; ĝi havas formon, — jen aro da sentoj; ĝi moviĝas kaj falas, — jen alia aro da sentoj. Tial mi scias pri ĝi nenion alian, ol la solajn sentojn ». El tio ĉi sekvas la konkludo « Entute nur unu ekzistas — la riĉa enhavo de psihiko » (Max. Verworn) k. t. p.

La angla aŭtoro Shaffield, en sia « Alia mondo aŭ spaco kvar-dimensia », tre sprite priskribas la disputojn inter la estaĵoj « liniaj » kaj « la plataj ». La unuaj, kiel loĝantaj en spaco *unudimensia* kaj pertio povantaj nur moviĝi *antaŭen kaj malantaŭen* en la linio rekta, neniel povis kompreni la kvadraton, venintan al ili por prediki la spacon *dudimensian*. La diritaĵo de l'kvadrato, ke oni povas sin movi ne sole antaŭen kaj malantaŭen, sed ankaŭ *dekstren kaj maldekstren* estis al mizeraj « liniuloj » nur « malsaĝa revo » kaj « neblaĵo ». Kompreneble la instruita kvadrato ridadis je tiuj ĉi duboj. Sed li mem, kiel estaĵo

« plata » loĝanta en la spaco nur *dudimensia*, neniel povis siavice kompreni nek la movon *supren* kaj *malsupren*, nek la naturon de korpoj *tridimensiaj* kaj tial neekmalkuraĝis ĉion ĉi nei, ĝis kiam levigita perforte el sia spaco dudimensia, estis per siaj propraj okuloj ekvidinta, ke la *Kubo* kaj aliaj korpoj en la spaco tridimensia vere ekzistas. Pri tiuj « liniuloj » kaj « platuloj » ni kontraŭvole ekmemoras, kiam okaze ni ekkonatiĝas kun hodiaŭaj kvazaŭ sciencaj aŭ filozofiaj verkoj. Ĉar la plej ofte ni trovas en ili tiom da « linieco » kaj da « plateco », ke al ni ŝajnas, kvazaŭ iliaj aŭtoroj estus falintaj sur la teron el ia ajn unu aŭ dudimensia mondo kaj alportintaj el tie sian specialan, « platan » aŭ « linian » logikon. La ekzemplojn ni ne citas; la legantoj mem sendube estas neunufoje renkontintaj tre « belajn » specimenojn de tiu « plata » kaj « linia » literaturo, filozofio kaj scienco.

Bedaŭrinde tiu ĉi « plateco » kaj « linieco » aperas ne sole en la kampo de *penso*; ĝi montriĝas ĉiutage kaj ĉiuloke ankaŭ en la regiono de *ago*. Ni faru ekzemple la analizon de hodiaŭa la plej fervora revolucia reformatoro de l'Rusa societo. Kion ni en li trovos? Nenion alian, ol malplenaĵon en la kapo, malamon en la koro, bombon aŭ malsaĝan proklamacion en la poŝo! Kiel oni vidas, li estas ankaŭ estaĵo vere « plata » aŭ eĉ « linia ».

Sed ne pli bonaj estas kaj ni mem konservatistoj kaj kristanoj. Kristo estas nia Majstro, sed ĉu ni Lin aŭdas? Li preĝis la *patron*, por ke ĉiuj estu unu (Jon. XVII, 21), sed ni ĝis nun restadas *dividitaj*. Kial? Ĉar unue niaj estroj, kondukantoj ne havas sufiĉe da saĝlarĝeco; due ni, kristanoj nuntempaj, mem ne zorgas ankaŭ forigi nian religian saĝmallarĝecon kaj daŭradas kviete similiĝi al la Shaffield'aj « liniuloj » kaj « platuloj ».

Certe sin trovas homoj dirantaj, ke oni ne povas plu tiel esti. Sed kiel ĝi devas esti, kion oni devas fari por la plibonigo de la nuna situacio, — pri tio ĉi, krom la ordinara recepto: « Vi prediku la Kristan instruon kaj pli forte batalu kun la « malkredeco », ni aŭdas pli nenion.

Ke la kredo estas granda forto, pri tio ĉi neniu el ni dubas. Sed oni tre ofte, bedaŭrinde, forgesas, ke la *Kredo ne estas ĉio*. Oni eĉ povas diri pli: ĝi ne estas eĉ trezoro la plej granda kiel

ĝin instruas S. Paŭlo « *Nunc autem manent fidès, spes, charitas : tria hæc major autem horum est charitas.* La lastan vorton, laŭ mia opinio, oni devas kompreni tie ĉi en signifo la plej vasta ne sole kiel amon al Dio kaj al proksimuloj, sed ankaŭ kiel amon al vero, al bono, al virto, al perfekteco, k. t. p. Ĉar ne amante la veron, la virton, la bonon, kiel oni povus amadi la Dion kaj la proksimulon ? !

Tial, por ke estu pli bone, ni ĉe la kredo metu ankaŭ *la amon*, la amon ne *mallarĝan* sed *vastegan*, ĉirkaŭprenantan ĉion ; kaj la Dion, kaj la homojn, kaj la kredon kaj la sciencan, kaj la Eklezion, kaj la patrujon, kaj la estintecon, kaj la estantecon, unuvorte ĉion, krom malvirto kaj malvero. « Ni eklarĝigu niajn korojn, ni eklarĝigu niajn saĝojn » — jen kia devas esti nia devizo. Ĉar la ĉefa nia malamiko, kiel ni jam diris, estas la duobla mallarĝeco : en la kampo de penso — la *mallarĝeco de saĝo* ; en la regiono de ago — la *mallarĝeco de koro kaj de volo*.

El ili du, la unua ne estis ĝis nun eĉ tute rimarkata kaj tial daŭradas en la tuta civilizita mondo *aŭtokrate reĝadi* ĝis nun. Ĉu ni permesos ke ĝi reĝadu ankoraŭ centjarojn ? Ne, ni ne povas ĝin permesi. Kion do ni devas fari ? *Ni devas senprokraste komenci kontraŭ ĝi bataladon !* Sed kiel ?

Laŭ mia opinio, antaŭ ĉio oni devas atente observadi ĉiujn aperojn de homa saĝmallarĝeco en literaturo, en filozofio, en teologio, en scienco, en politiko, en sociala kaj internacia vivo k. t. p. — Observinte do tiun aŭ alian ĝian aperon, oni devas tuj ĝin montri publike en la gazetaro, *kiel hontindan difekton, meritantan nenian pardonon* ; oni devas — ĉiam kaj ĉie — laŭte diri, ke la saĝmallarĝeco en la kampo de ideo estas nek reĝino, nek leĝdonantino, sed abomena miopa uzurpulino, kies ĝusta loko estas ekster la sanktejo de penso.

Por ke do tiu ĉi kruciro kontraŭ la homa saĝmallarĝeco fariĝu pli populara, ni konsilas traduki en naciajn lingvojn la belan verketon : « *AU LARGE ! par Joseph Serre, Lyon 1890* ». La aŭtoro, brila stilisto, pentras kun neimitebla spriteco la diversajn aperojn de homa saĝmallarĝeco en diversaj kampoj, literatura, scienca, filozofia, k. a... Oni tre malofte trovos alian simile belan verketon.

Kompreneble, ĝin tradukante en naciajn lingvojn, oni devus almeti ankaŭ specialajn aldonojn pri homa saĝmallarĝeco, kiom ĝi montriĝas en ĉiu nacio aparte.

Plue, kiel en ĉia batalado, tiel ankaŭ en la batalado kontraŭ la homa saĝmallarĝeco, oni devas memori, ke la fina venko dependas de nombro da batalantoj. Tial oni devas zorgi pri la fondo de speciala SOCIETO POR PROPAGANDI LA IDEON DE KRUCIRO KONTRAŬ LA HOMA SAĜMALLARĜECO. Portiu ĉi do celo estas bezona ankaŭ speciala organo.

Bedaŭrinde, ni ĝin estigi ne povas pro mil kaŭzoj, el kiuj la unua estas, — la manko da mono kaj povo.

Tial prezentinte nian ideon pri la senpardona milito kontraŭ homa saĝmallarĝeco, ni ekkuraĝas nur nin turni al la tuta ĉiu-monda esperantistaro, kun jena alvoko

« Homoj de bona volo kaj de larĝaj rigardoj ! Vi kuniĝu en unu fratan rondon kaj ekkomencu jam neprokraste la sanktan kruciron kontraŭ la homa saĝmallarĝeco, kiu ja estas kaj ĉefa kaŭzo de sociala malbono, kaj ĉefa barilo de la tuta civiliza-cio !... »

P-ro A. DOMBROVSKI, el St Peterburgo.

POR UNUIĜO DE KRISTANARO

Granda ĵurnalo angla, « The Daily News » (mart. 20-a) publikigis en Esperanto nian « *Leteron al ĉiuj pastroj kristanaj* ».

Okaze de tio ni ricevis aliĝojn. Jen nun la nomaro de tiuj kiuj skribis al ni, kaj aprobas l'ideon de *l'Unuiĝo de kristanaro* :

1. Dombrovski, Vas, Os. 1. 1. 52. — S. Peterburgo. — Pastro kalolika.

2. C. J. Van Oevelen. — Zoersel (Oostmal), Belgujo. — Pastro katolika.

3. Abato Requin, Draguignan (Var), Francujo. — Pastro katolika.

4. D-ro Vallienne, 79, B-do Montparnasse, Parizo.

5. J. C. Rust, en Soham, Anglujo. — Pastro de la Ŝtat-Eklezio.

6. A. Richardson, Institut St-Louis, Bruxelles. — Pastro katolika.

7. W. A. Shipway; 61, Legsby Avenue, Grimsby, Anglujo.

8. Arnold de Lisle, Netherton, Dudley (Worc.), Anglujo. — Protestantano.

9. Elisabeth O'Brien, 84, Petherston Kd, Canonbury, London. — El « *Quakers.* »

10. Henry Wallace, Victoria Crescent, Dew, Dewsbury, Anglujo. — Pastro Kongregacionalisto.

11. W W, Goldstraw. Lamberhead green, Wigan, (Lancash), Anglujo, Primitiva metodista Pastro.

The Ethical Review de marto 24-a, angla revuo semajna, raportas pri la publikigo de nia letero en la *Daily News*. kaj eldonas anglan tradukon de parto de la letero.

La Revue du Clergé Français (Revuo de l'Franca Pastraro), aprilo 13-a, raportante pri la enhavo de E. K. marta, en ĝia « *Tra la gazetoj* », citas l'artikolon *Unuiĝo de Kristanaro*, kaj la proponon fondi *Societon por Unuiĝo de Kristanaro*.

Fine Pastro Dombrovski, bone konata de niaj legantoj, publikigis en *Ruslanda Esperantisto* (aprilo) « *Malkoeritan Leteron al S-o Abato Em. Peltier*. Tiu letero, tre profunde pripensita, estas entute citinda. Ni ĝin publikigos en nia proksima numero, (1)

Oni vidas, ke la ideo estas pli kaj pli komprenata kaj ŝatata. Tamen neniu respondis al ni pri la propono fondi *Societon de Studoj por Unuiĝo de Kristanaro*.

Bonvolu pripensi, ke mi tute ne intencis, — per mia publika *Letero*, — ĵeti krion « platonikan » (?) al la kristanaro, aŭ fari belan « geston » por ricevi kelkajn laŭdojn.

Mi deziregis helpi sincere al la renuiĝo de fratoj disigitaj. Tial mi denove parolas pri la fondinda « *Societo de Studoj* ».

La « *Unuiĝanoj* » bezonas esti tre singardemaj en sia agado se ili volas trafi la celon. Fakte nun malmultaj ĝis nun estas tiuj, kiuj, en ĉiu aparta eklezio, komprenis plene la ideon de reunuiĝo. Pro tiu malmulteco ili devas mezuri siajn vortojn, ne uzi esprimojn kiuj estus kondamnindaj en sia propra Eklezio. Alie oni tuj ekkrios: vi estas « *Apostaziuloj!* »

1. Ni ĝin ricevis tro malfrue por la maja numero.

Ŝajnas ke oni devas ekzameni la plej facilajn demandojn, la malpli gravajn ; ekz : pri la diversaj organizacioj.

Ŝajnas ankaŭ, ke la demandoj devas esti pritraktitaj ne filozofie, ne teologie, sed nur *historie* , en la komenco ; ĉar la plej gravaj kaŭzoj de disiĝo eĉ en dogmaro, estas ĉiam pli-malpli miksitaj de gravaj *historiaj* faktoj.

Per tio, kion oni ĵus legis, klariĝas kial mi proponis, kiel unua paŝo farota, la fondon de « *Societo de studoj por Unuiĝo de Kristanaro* » Eble oni devus, en tiu titolo, aldoni la vorton « *historiaj* », kaj diri « *Societo de historiaj studoj.....* ». Tiamaniere, mi pensas, ni estus, en niaj diversaj eklezioj, plene ŝirmitaj kontraŭ la riproĉoj de niaj sameklezianoj. Estas ja nenio riproĉinda en la fakto partopreni en historiaj studoj por la bonega celo helpi al la reunuiĝo de Kristanaro.

La plej bonaj studoj estus publikigitaj en E. K. aŭ aparte eldonitaj laŭ la deziro de l'aŭtoroj. La komitato de la Societo ekzamenus la manuskriptojn kaj decidus pri tiuj, kiuj estus eldonotaj kun aprobo de la Societo.

Karaj legantoj kaj karaj « Unuiĝanoj », bonvolu konigi en E. K. vian opinion, vian akcepton aŭ neakcepton kaj viajn pli bonajn proponojn.....

Em. Peltier.

EL LA MANUSKRIPTO DE L'PREĜARO ¹ DIES IRAE.

Tago venĝa, tiu tago !
Mondo estos varma cindro,
Laŭ Davido kaj sibilo.

Kiom granda estos tremo,
Kiam venos la Juĝanto,
Ĉion rekte rigardanta.

Sonos mire kupra korno,
Kiu tra la tombaj kampoj
Ĉiujn puŝas antaŭ trono.

Miros Morto kaj Naturo
Kiam ĉiuj ekrevivos
Por respondi al Juĝanto.

Estos libro malfermita ;
Ĝi enhavos skribe ĉion.
Per ĝi ĉiujn oni juĝos.

Kiam sidos la Juĝanto.
Ekaperos sekretaĵoj ;
Ĉio estos malkovrata.

Malfeliĉa mia sorto,
Kian helpon mi alpetos ;
La justul'mem ŝanceliĝos.

Di' timinda kaj majesta,
Kiu savas sindoneme,
Savu min, kompata fonto,

¹. Tradukis Pastro R. Laisnez

Pensu, Ho ! Jesuo dolĉa
Ke por mi, vi teren venis ;
Min ne lasu tiun tagon.

Min serĉante, vi laciĝis,
Por mi krucon vi suferis,
Tia peno ne perdiĝu.

Ho Juĝonta juste kulpojn,
Vi pardonu miajn pekojn,
Antaŭ tiu juĝa tago.

Mi ĝemadas, ĉar mi pekis,
Honto klinas mian frunton ;
Peteganton, Di', indulgu.

Magdalenon vi pardonis,
La ŝteliston senkulpigis,
Kaj esperon al mi donis.

Miaj preĝoj ne meritas,
Sed vi, estu malsevera,
Min ne ĵetu en gehenon.

Kun bonuloj min konduku,
For de malbonuloj, metu
Min ĉe via dekstra flanko.

Malbenitoj konfuziĝos,
Kaj ĵetiĝos en flamegojn ;
Min avolku kun la bonaj,

Mi peregas kliniĝante,
Kaj kun koro premegata ;
Benu mian lastan horon.

Ploroplena tiu tago,
Kiam staros el la cindroj.
La juĝota homo kulpa.

Al li do indulgu, Dio,
Pia Jesu' Sinjoro,
Donu alli ripozon.

AMEN.

LA LASTA ABENCERAGO (Sekvo)

(de Châteaubriand)

« Gvidisto, li ekkriis, estu feliĉa ! Ne kaŝu al mi la veron, ĉar kvietaj estis la ondaj en la tago de via naskiĝo, kaj ekkreskadis la luna lumeco. Kiu estas tiuj turoj brilantaj kiel steloj super arbaro verda ?

— Ĝi estas l'Alhambra', respondis la gvidisto.

— Kaj tiu alia kastelo sur tiu alia monteto ? diris Aben-Hamet?

— Ĝi estas la Generalejo, repondis la hispano. En tiu kastelo troviĝas ĝardeno plantita per mirtoj, en kiu oni pretendas ke Abenceraĝo estis surprizita kun la sultanino Alfaima'. Pli malproksimen vi vidas l'Albaizin'on, kaj pli proksime al ni la Turojn Orumitajn. »

Ĉiu vorto de l'gvidisto malĝojigis la koron de Aben-Hamet. Kiom kruele, peti helpon de fremduloj por ekkoni la monumentojn de siaj prapatroj kaj rakontigi al si de indiferentuloj la his-

torion de sia familio kaj de siaj amikoj! La gvidisto, finigante la pripensojn de Aben-Hamet ekkriis:

— Ni marŝu sinjoro Maŭro, ni marŝu. Dio volis tion: kuraĝigu!

Ĉu Francisko I-a ne estas hodiaŭ mem malliberulo en nia Madrid'! Dio volis tion. »

Li malmetis sian ĉapelon, faris grandan krucosignon kaj frapis siajn mulinojn.

L'Abenceraĝo rapidiginta la sian sia vice, ekkriis: « ĉi tiu estis skribita (1) »; poste ili malsupreniris al Grenad'.

Ili pasis apud la dika frakseno fama pro batalo de Muca kaj de la ĉefa kavaliro de Kalatrava', dum la regado de l'lasta reĝo de Grenad'. Ili ĉirkaŭiris la promenejon Alamejda'on, kaj eniĝis en la urbon per Elvira pordo. Ili supreniris la Rembla'on ka baldaŭ alvenis ĉe placo ĉiufanke ĉirkaŭita per domoj laŭmaŭra arkitekturo.

Sur tiu-ĉi placo, bazaro estis malfermita por la maŭroj Afrikaj, kiujn silka komerco de la Viga' venigis amase al Grenad'.

Tien la gvidisto kondukis Aben-Hamet.

Abenceraĝo estis tro malkvieta por ĝui iom da ripozo en sia nova loĝejo; l'amo al la patrujo lin turmentis.

Ne kontraŭbatalante la sentojn, kiuj konfuzis sian koron, eliris meznokte por vagadi en la stratoj de Grenad'.

Li ekprovis rekoni per siaj okuloj aŭ manoj kelkajn el monumentoj, kiujn la maljunuloj al li tiel ofte priskribis.

Eble tiu alta monumento, kies murojn li ekvidis tra l'mallumoj, iam estis la hejmo de l'Abenceraĝoj; eble sur tiu ĉi dezerta placo okazis la festoj kiuj altigis la Grenad'an gloron ĝis la nuboj. Tie pasadis dancantaj grupoj belege vestitaj per orŝtofoj; tie alvenis remilŝipoj ŝargitaj per armiloj kaj floroj; drakoj kiuj disĵetis flamojn kaj kaŝis en iliaj flankoj famajn militistojn: geniaj elpensadoj por la plezuro kaj ĝentileco.

Sed, ve! anstataŭ la sono de l'« anafin'oj » (2), anstataŭ trumpeta bruo kaj amaj kantoj, profunda silento ĉirkaŭis Aben-Ha-

1 Esprimo oftege uzata de la mahometanoj, kaj aplikata de ili al la plimulto de l'okazintaĵoj. (Noto de Châteaubriand).

2 Muzikilo maŭra.

met. Tiu-ĉi mutigita urbo estis ŝanĝinta ĝiajn loĝantojn, kaj la venkintoj ripozis sur la kuŝejoj de la venkitoj.

« Ili dormas, do tiuj fieraj hispanoj, — ekriis la juna maŭro indignita, — sub la tegmentoj elkiuj ili ekzilis miajn praavojn ! Kaj mi, Abenceraĝo, maldormas nekonata, sola, forlasita je la palacpordo de miaj prapatroj ! »

Tiam Aben-Hamet pripensis pri la homaj sortoj, la ŝanĝoj de l'ŝanco, la faloj de l'imperioj, fine pri tiu ĉi Grenad', surprizita de siaj malamikoj meze de l'plezuroj, kaj subite ŝanĝinta siajn florajn girlandojn por feraj ĉenoj. Ŝajnis al li, ke li vidis la urbanojn forlasantajn iliajn hejmojn, vestitajn per festaj vestoj, kiel gastoj, kiuj en la malordo de sia ornamaĵo, estas subite forpelataj el la festena ĉambro per brulado.

Ĉiuj tiuj imagoj, tiuj pensoj moviĝis en l'animo de Aben-Hamet. Plena je doloroj kaj bedaŭroj, li precipe pripensis realigi la projekton, pro kiu li venis Grenad'on la maten-krepusko lin surprizis.

L'Abenceraĝo estis erarinta pri sia vojo ; li troviĝis for de l'bazaro en posturbo malproksima de l'urbo.

Ĉio dormis, nenia bruo maltrankviligis la silenton de l'stratoj, la porloj kaj fenestroj de l'domoj estis fermitaj nur la voĉo de l'koko proklamis en la loĝejo de l'malriĉulo la revenon de l'penadoj kaj laboroj.

Vaginta dum longa tempo kaj ne trovinte sian vojon, Aben-Hamet aŭdis, ke pordo malfermiĝis. Li vidis eliri junan virinon, vestitan kiel la gotaj reĝinoj skulptitaj sur la monumentoj de niaj antikvaj abatejoj.

Ŝia nigra korseto, ornamita per nigraj perloj, premetis ŝian talion elegantan ; ŝia mallonga jupo, mallarĝa kaj sen faldoj malkovris maldikan kruron kaj ĉarman piedon ; puntan manteleton ankaŭ nigran ŝi havis sur la kapo ; per ŝia maldekstra mano ŝi tenis tiun manteleton, krucigitan kaj fermitan kiel koltuko malsupre de ŝia mentono, tial ke el ŝia tuĉa vizaĝo oni ekvidis nur grandajn okulojn kaj rozan buŝon.

Maljuna virino akompanis ŝiajn paŝojn, paĝio portis antaŭ ŝi preĝaron ; du servistoj, ornamitaj per ŝiaj livreaj koloroj, iom malantaŭe sekvis la nekonatan belulinon ; ŝi eliris por la matena preĝo, kiun sonorilaj tintoj anoncis en proksima monaĥejo.

Aben-Hamet, kredis vidi l'angelon Israfil' on, la plej junan el la *huri'oj* (1).

La hispanino ne malpli surpriza rigardis l'Abenceraĝon, kies turbano, robo kaj armiloj ankoraŭ plibeligis la nobelan vizaĝon.

Rekonsciiĝinte el ŝia ekmiro, ŝi signodonis al la fremdulo, gracie kaj libere, laŭ maniero kutima ĉe la virinoj de tiu lando :

— Sinjoro Maŭro, ŝi diris, ŝajnas ke vi ĵus alvenis en Grenad' : ĉu vi eraris pri via vojo ?

— Sultanino de l'floroj, respondis Aben-Hamet, ĉarmo por l'okuloj homaj. Ho kristana sklavino, pli bela ol la virgulinoj de Georgio, vi divenis ! Mi estas fremdulo en tiu ĉi urbo : perdita meze de tiuj palacoj, mi ne povas retrovi la maŭran bazaron. Mi petas Mahometon, ke li tuŝu vian koron kaj rekompensu vian gastamemon !

— La maŭroj estaj famaj pro ilia ĝentileco, diris la hispanino kun la plej gracia rideto, sed mi estas nek sultanino de floroj, nek sklavino, nek kontenta, ke vi rekomendis min al Mahomet'. Sekvu min, sinjoro kavaliro, mi vin kondukos al la maŭra bazaro. Ŝi malpeze paŝadis antaŭ l'Abenceraĝo, kondukis lin ĝis la pordo de l'bazaro, ĝin montris per la mano, pasis malantaŭ palacon, kaj malaperis.

De kio ja dependas la kvieteco de la vivo ! La patrujo ne okupas plu sola la tutan animon de Aben-Hamet Grenad' ĉesis esti por li dezerta, forlasita, sola ; ĝi estas pli amata ol iam de lia koro ; sed nova allogo plibeligas ĝiajn ruinojn ; alia ĉarmo nun miksiĝas kun la memoro pri la praavoj.

Aben-Hamet trovis la tombejon kie kuŝas la cindroj de l'Abenceraĝoj ; sed dum li preĝas, genufleksas, elverŝas filajn larmojn, li ja pripensas ke la juna hispanino iafoje pasis apud tiuj tomboj, kaj li plu ne trovas siajn prapatrojn tiel malfeliĉaj !

Vane li volas okupiĝi nur pri sia pilgrimo al la lando de siaj patroj ; vane li trairas la montetojn de l'Duro kaj Ksenil, por tie rikolti medicinajn kreskaĵojn je l'matenkrepusko la floro, kiun li nun serĉas, estas la bela kristanino.

(1) Virino kiu en la mahometa paradizo kunhelpas al la feliĉeco de l'elektitaj.

Kiom da senutilaj klopodoj li jam faris por retrovi la palacon de sia ĉarmulino !

Kiom da fojoj li ekprovis repaŝadi tra la vojoj, tra kiuj lia gvidantino dia lin konkudis ! Kiom da fojoj li kredis rekoni la sonon de tiu sonorilo, la kanton de tiu koko, kiujn li aŭdis apud la domo de la hispanino !

Trompita per similaj bruoj, li tuj alkuras ĉi-flanken, kaj la magia palaco ne montriĝas al siaj rigardoj !

Ofte ankaŭ la similmformaj vestoj de l'Grenadaj virinoj donis al li esperon momentan ; de malproksime ĉiuj kristaninoj estis similaj al l'amatulino de lia koro ; de proksime neniu posedis ŝian belecon aŭ ĉarmecon.

Aben-Hamet, vane vizitis la preĝejojn por retrovi la fremdulinon ; li eĉ iris ĝis la tombo de Ferdinando kaj Izabelo ; sed tio estis ja la plej grava ofero, kiun ĝis nun li faris al Amo.

Ian tagon li serĉis medicinajn herbojn en la valo de l'Duro. La suda monteto subtenis per ĝia florkovrita deklivo la murojn de l'Alhambra' kaj la ĝardenojn de l'Generalejo. La norda monteto estis ornamita de l'Albaizin', per agrablaj fruktoĝardenoj kaj grotoj en kiuj loĝadis popolamaso.

Ĉe l'okcidenta rando de l'valo oni ekvidis la preĝejajn turojn de Grenad', kiuj ope altiĝis meze de verdaj kverkoj kaj cipresoj. Ĉe l'alia rando, je l'oriento, la rigardo renkontis sur ŝtonegaj pintoj, monaĥejojn, ermitejojn, kelkajn ruinojn de l'antikva Iliberio, kaj tre malproksimen, la suprojn de la Siera-Nevada. La Duro disvolviĝis meze de la valeteto ; laŭ ĝia fluo vidiĝis freŝaj muelejoj, bruantaj akvofaloj, rompita arkadoj de roma akvokonduko, kaj pontaj ruinoj de l'maŭra epoko.

Aben-Hamet estis nek sufiĉe malfeliĉa nek sufiĉe feliĉa por bone ĝui la ĉarmecon de soleco ; kun distreco kaj indiferenteco li trairis tiujn ensorĉemajn randojn. Dum li sencele paŝadis, li eniris arban aleon, kiu zigzagis sur la deklivo de monteto Albaizin' Kampodomo ĉirkaŭita per densa arbareto baldaŭ montriĝis je siaj okuloj alproksimiĝante al la densa arbareto, li aŭdis voĉojn kaj gitarajn sonojn.

Inter la voĉo, la trajtoj kaj la rigardoj de virino estas rilatoj, kiuj neniam trompos viron, kiun amo posedas.

— Estas mia « *huri* » ! diris Aben-Hamet, kaj li aŭskultas kun koro batanta : aŭdinte la nomon de Abenceraĝo, multfoje rediritan, lia koro ankoraŭ pli rapide batadis. La nekonatulino kantis kastilianan romancon, kiu rakontis la historion de l'Abenceraĝoj kaj Zegrís'oj.

Aben-Hamet ne povas plu kontraŭbatali sian kortuŝecon ; li trapasas mirtan branĉobarilon kaj falas meze de junaj virinoj, kiuj timigitaj kriadante forkuras. La hispanino kiu estis kantinta kaj ankoraŭ tenis la gitaron, ekkrias

— « Estas la sinjoro Maŭro ! Kaj ŝi alvokas siajn kunulinojn.

— « Plej amata de la genioj, diras l'Abenceraĝo, mi vin servis kiel Arabo serĉas fonton en la tagmeza varmegeco ; mi aŭdis la sonojn de via gitaro ; vi gloris la heroojn de mia lando, mi vin divenis pro la beleco de viaj esprimoj, kaj mi alportas al vi la koron de Aben-Hamet.

— Kaj mi, respondis « Dona Blanka », pensante pri vi, mi rediris la romancon de l'Abenceraĝoj. De kiam mi vin vidis, mi imagis ke tiuj maŭraj kavaliroj estis al vi similaj.

Elparolante tiujn vortojn, la frunto de Blanka rozkoloriĝis. Aben-Hamet ekvolis genufleksi apud la juna kristanino por diri al ŝi ke li estas la lasta Abenceraĝo ; sed ankoraŭ iom da singardemo haltigis lin ; li timis ke lia nomo, tro fama en Grenad', ne maltrankviligu la urbestron.

Apenaŭ finiĝis la milito de l'Morisk'oj, kaj ĉi momente la apudesto de unu Abenceraĝo povis inspiri ĝustajn timojn al la hispanoj. Tio ne signifas ke Aben-Hamet iel timis danĝeron, sed li tremetis pensante ke li estus devigata eterne malproksimiĝi de l'filino de « don Rodrigo. »

(*Sekvo venos*) Tradukis : ELEDA KAJ VINKO.

PAĜO DE L'DIREKTORO

La pago de l'abonoj. — Multaj abonintoj ne anko rapa gis sian abonon. Ni insiste petas, ke ili bonvolu sendi l'abonmonon, sen ke ni estu devigitaj sendi al ili poŝtan kvitancon. Ili ŝparu samtempe sian monon kaj nian tempon. Plie oni devas komprenis ke la presisto devas ĉiumonate pagi siajn laboristojn, — kaj

sekve li bezonas esti ankaŭ pagata pro sia laboro.... Se do la abonintoj ne regule pagas, ni devas mem antaŭpagi la monon al la presisto. Ni esperas, ke niaj legantoj serioze atentos tiun avizon.

Preseraroj. Ni petas la legantojn, ke ili nin senkulpiĝu pri la multegaj preseraroj de la lasta numero. Ni tre zorge korektis la presprovaĵojn: sed, — kiel ofte okazas, — la kompostistoj ne faris la montritajn korektaĵojn. Pro malsano, ni ne povis, kiam la revuo aperis, relegi la lastan presprovaĵon. Ni do devigis la presiston eldoni apartan folion kun ĉiuj preseraroj.

La preĝaro. Oni legos en tiu ĉi numero belan paĝon el la manuskripto de l'Preĝaro. Malrapide kreskas la nombro de la subskribantoj. Se ni ricevos ankoraŭ 50 subskribojn, ni eble presigos la libron; sed tiuokaze, ni estos devigitaj peti pli altan prezon de tiuj, kiuj petos la Preĝaron nesubskribinte.

Al la Direktoroj de Gazetoj, niaj kunfratoj. Ni sendis al ĉiu gazeto avizon sur poŝtkarto pri la pli grandigo de E.K. kaj pri la ŝanĝo de l'abonprezo. Multaj gazetoj tamen forgesis anonci la diritajn ŝanĝojn. Bonvolu niaj kolegoj atenti tion en la venontaj numeroj de la gazetoj.

Ankaŭ ni proponis interŝanĝon po 2 ekzempleroj. Ni ja sendis 2 ekzemplerojn de E. K., sed nur kelkajn revuojn ni ricevis po 2 ekzempleroj.

EN ESPERANTUJO

REVUO DE LA REVUOJ ESPERANTISTAJ

Lingvo Internacia (marto 1-a). — Versfarado kaj Esperanto. (D-ro Vallienne). Raportas pri la diversaj sistemoj de versfarado en Esperanto.

Konstatas, ke tiu, kiu, tradukante ian poemon, kontentiĝas nur je la senco kaj malŝatas la formon, tiu homo tradukas nur parton kaj kelkafoje la parton malpli gravan de la poeta verko; kaj pro tio li faras malbonan laboron.

Prezentiĝas triobla demando Ĉu Esperanto sklaveme sin alligos al ia fremda versfarado?

Ĉu Esperanto al si altrudos specialan kaj solan versfaradon?

Ĉu Esperanto imitos libere ĉiujn versfaradojn de lingvoj naciaj, kiujn ĝi estas tradukonta ?

Pri la unua demando ŝajnas ke nur unu respondo estas ebla. Se komence la germana versfarado estis elektita, tio devenas de tio la unuaj esperantistaj poetoj estis germanaj aŭ rusaj : kaj ili pli bone konis tiun versfaradon ol la aliajn.

Pri la dua, mi respondos : viroj tre lertaj kiuj kreis por esperanto specialan versfaradon, faris laboron tute rimarkindan. Tiu versfarado inde kaj juste estas uzebla por originalaj versaĵoj. Sed laŭ mia opinio estas malsaĝe ĝin trudi por traduko de poeziaj verkoj pli malpli similaj al la francaj poemoj, ĉar ĝi tute ne povas sin alfari al ili.

Pri la tria, en tiu artikolo troviĝas la respondo (jesa). »

Aliaj artikoloj : Preĝo sur l'Akropolo, de Renan (trad. Viktor Dufeutrel) Rimarkinda pro la bonega stilo. — La sekretoj de la sovaĝuloj (Marcel Finot). — Songo (Sully-Prudhomme), esper. D-o Philippet. — Terkultura kalendaro (Paul Champion). — Movado esperantista. — Gazetaro.

Marto 15-a. — « Versfarado kaj Esperanto. » Jen la konkludo de tiu rimarkinda studo « Jen estas do tio, kion mi proponus, se mia malforta voĉo estus aŭskultinda :

« Ekzistas speciala versfarado por Esperanto : ĝi estas verko tute perfekta, kaj mi kredas ke esperantistaj poetoj tute prave ĝin uzos : sed ĝi estas verkota por originalaj versaĵoj, en kiuj la speciala genio de Esperanto povas facile divastiĝi.

« Sed por tradukoj, ĉar Esperanto, dank'al ĝia fleksebleco povas tute facile sin alfari al ĉiuj naciaj versfaradoj, mi kredas ke estus pli saĝe se ĝi uzus ilin ĉiujn, la anglan versfaradon por Miltono, la italan por Taso, la germanan por Goeto, k. t. p. Laŭ mia opinio, jen estas la plej bona rimedo por ke poezia ESPERANTO restu internacia » (D-ro Valienne). — Artikolaro: Pri la rusa poezio nova (N. Kabanov). — Memnomo, aŭ la homa saĝeco, (de Voltaire, — trad. F. Lallemand.) — Valso, poemo (H. Sentis). — Miksaĵoj. — Gazetaro esperantista. — Briĝa terminaro. (Horace Huet). — Lingvaj demandoj. — Aldono literatura : Rememoro pri Solferino (sekvo).

Internacia sciencia Revuo. — (Marto) « Ĉu ni fine posedas pratiktan flugmaŝinon ? » — P. Corret. S-o P. Corret

rakontas la diversajn eksperimentojn de la fratoj Wright. « La aparato verŝajne estas proksimume sama, kiel la Wright'a aerflitilo senmotora, per kiu estas faritaj la unuaj eksperimentoj. Ĝi havas enverguron da 12 m. 20; la surfacoj estas longaj je 1 m. 80 ĉe la meza parto, kaj je 1 m. 20 ĉe ĉiu ekstremaĵo. La avianto kuŝiĝas horizontale en la maŝino, kaj turnigas ĝin, ĉu modifante la paralelecon de la du portantaj surfacoj, ĉu agante per malantaŭa vertikala direktilo... Fine la elpensintoj diris ankaŭ kelkajn detalojn pri sia eksperimentejo, kaj pri la flugadoj faritaj. La eksperimentejo estas ebena herbejo, longa proksimume je 800 metroj kaj larĝaje 200 m., kies formo estas regula; la rondoj designitaj per flugado estis longaj proksimume je 1 km. kaj duono... Oni diras kaj rediras, ke, kiel la naturo, la scienco nenion faras per saltoj. Tio estas ĝustega; sed estas iaj paŝoj tiel rapidaj, ke ili iluziigas al ni grandegan salton en la nekonataĵon... — (Laŭ *Cosmos*.)

Por ne senti la malvarmon. — (D-ro J. Bergonie.) — Interese raportas pri la divers-manieroj sin protekti kontraŭ l'atakoj de l'malvarmo. — La tero kaj geologia historio de Maroko (fino) (St-Meunier.) — La manĝantoj de mizoksiloj (H. Coupin). — Pri la teorio de la rivelado (H. Reeb). — Kantado kaj tuberklozo (D-ro A. Trinitè.) Atako de pentramo, de A. Koffman. — Lingvaj demandoj diversaj.

Tra la Mondo (Marto). — « Principoj de Decimala klasigo kun apliko al Esperantismo », de G. Chavet: « En plena bibliografia katalogo, oni devas trovi respondon al du jenaj demandoj 1^e kiuj estas la verkoj presitaj (libroj, broŝuroj aŭ artikoloj) publikigitaj de S-ro N., pri ĉiu objekto, ? 2^e kiuj estas la verkoj publikigitaj pri speciala objekto de ĉiuj aŭtoroj? La unua demando necesigas la ordigon de la titoloj de la verkoj, laŭ la alfabeto ordo de la nomoj de l'aŭtoroj; la dua necesigas la klasigon de tiuj titoloj, laŭ metoda ordo, montrata en speciala klasiga tabelo...

Se oni skribas tiujn titolojn sur kartojn neligatajn kaj sekve, facile translokeblajn, skribante sur ĉiun karton nur unu titolon oni tiel starigas surkartan katalogon, al kiu oni povas aplikí ĉiujn ajn klasigajn sistemojn kaj kiu povas esti ĉiam plenigebla, per almeto de novaj karto, neŝanĝante la ordon de la antaŭaj.

Se por klasigi tiujn kartojn, oni uzas metodan sistemon, laŭ la objektoj de la verkoj klasigotaj, sistemon montrantan en ĝenerala tabelo, klasiga, enhavanta ĉiujn fakojn de la homaj konoj, oni povas tiel ebligi universalan bibliografian katalogon sur karto, en kiu ĉiuj verkoj, pri ĉiuj objektoj, povos esti klasigataj. » — Ĉe Alĝesiras, P-ro Bord. — La plej norda instituto de la mondo (K. Gutke). — Studado pri la fama pentristo P. P. Rubens. — La Alĝeria Ekspozicio. — Karnavalo de Nice (F-ino J. Joulin). — La elsputoj de Vezuvio! (A. Gallois). — La vivado de Teoplantisto en Hindujo. — La torento el Saŭmo, de Daniel Lesueur. — Alĝeriaj skizoj.

Espero Pacifista. (jan.-febr.) Pri la kaŭzoj kaj sekvoj de l'ekstrem-orienta milito. Letero de S. J.-F. Twombly. — Respondo de S-ro G. Moch. — Triopa flava unuiĝo. (G. Chavet). Tre lertaj rimarkoj el kiuj ni eltiras jenon « La Triopa flavrasa unuiĝo povas nur havi malpacifistajn rezultatojn, ĉar ĝi povas kaŭzi militojn kaj progreson de militarismo. Tre certe la faktoj kiujn ni notis en tiu artikolo estos montrataj de la eŭropaj deputatoj kiuj petos de la parlamentoj pligrandigon de la armadoj. En la alia loko de tiu numero, ni notas la ideojn de Alfred Mahan, kiuj pravigas tiun antaŭvidon. Ĉu la pacifistoj devas subteni tiun programon? Ĉu ili devos konkludi ke oni devas starigi fortegan Eŭropon kontraŭ fortega Azio; ke nur per la plimultigo de niaj soldatoj kaj armiloj, ni evitos la flavrasan danĝeron.

La vero estas ke la flavrasuloj sin armadas, ĉar la blankrasuloj estas armitaj, ĉar la blankrasuloj estis jam ofte maljuste kaj honeste uzataj kontraŭ la flavasuloj; la Azianoj sin armadas ĉar ekzistas, por ili, ĉiam pli granda blankrasa danĝero. »

Sciigoj pri la societo kaj la grupo Pariza. — Militfaktoj kaj armadoj. — Politiko internacia: Tria tutamerika Kongreso. — Pacifisma movado. — Esperantisma movado. — Libroj. — Tiu numero de Espero Pacifista, enhavas 60 paĝojn por la du monatoj: Januaro kaj Februaro. — Ĝi estas plena je bonegaj artikoloj. La esperantistoj devas ĝin subteni kaj rekomendi.

L'Esperantiste. (marto) — Fino de l'studado de S-o de Beaufront pri la S. f. p. E., ĝiaj grupoj kaj l'Esperantiste.

— Montras la grandan utilecon de ili. — « Ĉu la S. f. p. E. estis, kaj ankoraŭ estas utila? — Per sia propagando komencita tuj de la unua horo, dank' al sia organo kaj specialaj folioj aŭ broŝuroj ; per la grupoj naskiĝintaj el ĝi kaj kies bazojn ĝi metis tuj de 1899 ; per sia radio — ne aŭtoritata sed prozelitisma — en la fremdaj landoj, kie ĝi liveris ĉiujn unuajn fondintojn aŭ pionirojn de la naciaj societoj Esperantistaj (Esceptante *Esperon*), la S. f. p. E. certe faris agon utilan al Esperanto en la tempo pasinta. Se nun ĝi ial malaperus, ĝi rajte povus esti fiera, komparante kion ĝi lasus kun tio, kion ĝi trovis, kaj pensante, ke sen ĝi eble ĉio tio ĉi ne estus naskiĝinta.

Sed ĉu ĝi ankoraŭ estas utila? ĉu nome ĝi estas tia rilate al grupoj? Ŝajnas ke la demando povas esti metita preskaŭ tiama-niere « Ĉu patrino estas utila por siaj infanoj? » Ĉar al ni ja ŝajnas, ke oni ne povas malkonfesi, ke la grupoj eliris el la S. f. p. E.. Ĝi kaj ankoraŭ naskiĝas tie ĉi aŭ tie el antaŭekzistantaj societanoj. »

Renovigo de triono en la komitato de la S. f. p. E.. Estis elektitaj S-oj Breon, D-ro Javal, Canet, René Lemaire, Delfour. Niajn plej sincerajn gratulojn al la kvin elektitoj! — Kroniko. Bibliografio. — Klarigo de D-ro Zamenhof pri la kvina cirkulero de l'Esperantista organiza Komitato. — La Krucumo (Zacherl Charles). La testamento de Peĉjo (M. J. Evrot). — Internacia korespondado Esperanta. — Amuzaĵoj. —

La Belga Sonorilo. (marto). — Nia revueto! (D-ro Seyneave) Pri kaj por la naciaj societoj. — « Oni devas tre danki S-on Cart, kiu vere elpensis novan potencon rimedon de unuiĝa agado kaj de propagando. Jes, la naciaj societoj interrilatiĝu, ili interligu korespondadon, ili organizu kune, se estos necese, internaciajn laborojn kaj la rezultato de tia kuna laboro (kiu povus dubi pri tio?) estos certe bonegaj.

Oni ne kromprenu malĝuste miajn pensojn mi tute ne intencas diri ke la naciaj societoj devus regi la Esperantistaron: ne, sed mi diras ke estas dezirinde ke ili kunigu siajn fortojn, ke ili konsiliĝadu kaj laboru kune, kaj mi opinias ke iu alportus grandan utilon al nia afero. — Grava alvoko.. — La popleto sur la monteto (de Herman Teirlinck) — Knabaĵo — Flandra fako. — Belga kroniko. —

The British Esperantist — (Marto). — Nova provaĵo celanta universalan lingvon. — La aŭtoro de tiu ĉi libreto « ĝuste trafis la veran sciencan metodon por konstrui la radikvortaron de komuna lingvo por la hindogermanaj rasoj; kaj, ŝajne ke li trafis ĝin memstare, kaj ne koniĝinte kun la fundamentoj de la lingvo Esperanto. Sed nek sola, nek la unua, li atingis tiun konkludon, ĉar lia principo estas la principo mem de Zamenhof. Kaj ĝuste per tio la Zamenhof'a lingvo Esperanto diferencas de la provaĵoj kiujn oni nomas « filozofiaj ».

... La delegacio por l'alprenado de helpanta lingvo « Esperanto » en la diversnaciaj akademioj. — Angla kroniko. — Aldono literatura : La kuracisto du Kukumio, esp. M. David. — Mariarica (de E. W.) — Julio Cezaro (sekvo). — Presado, Esperanto (komparaĵo), de S-o J. Ellis, el Keighley. Tre kleraj rimarkoj de nia kunlaboranto pri la bonfaroj de ambaŭ « iloj. »

Germana Esperantisto (marto). — Leopold Einstein, (Zamenhof) fino. -- El germanlingvaj landoj. — Gazetaro. — Represado de « Dogmoj de Hilelismo ». — Idiom neutral. — J. B. raportas tiele pri l'« Idiom neutral » Kiel oni scias « *Idiom neutral* » estas la rekta posteulo de Volapuk. Sed klopodante divastiĝi nun, kiam la granda supereco, la mirindaj ecoj kaj praktikta uzebleco de Esperanto estas pruvitaj kaj konataj da centmiloj da homoj, kaj la Zamenhofa lingvo havas jam tiel potencon amikaron, estas tre dubeble ke ĝi varbos grandan kvanton da adeptoj. »

Ruslanda Esperantisto (marto). — Kelkaj rimarkoj pri Hilelismo, de P-ro A. Dombrovski. — Al feliĉo, de Iv. Najivin. — Krio de malespero (Leo Belmont). — Esperantista movado. — Esperanto en Italujo. — Konfuzo, (skizo de Winnicki.) La « Herveismo ». — Pri la alvoko de S-o V Devjatnin. — Esperanta Centra Oficejo. — Esperantista organiza komitato.

La Suno Hispana. — Oni povas vidi sur la unua paĝo portreton de la sindona sekretario de la H. S. p. p. E., Pastro Ant. Guinard. — Du Tartarenoj, (A. Daudet) trad. E. Bacquet. Seiigoj. — Raportas pri la esperantista movado tra la mondo. — Al harpo, de V. Inglada. — Bibliografio. -- Aldono literatura : Kuracisto per batoj.

Esperantisten. (marto) Esperanto kaj la Svedaj abstinenculoj. (Konrad Gutke). — Esperanta ekspozicio en Amiens. — Propagando en la komercistaro. — Songo de Esperantisto (Alceste) bonega poezio imitita de la « Espero ».

La Algeria Stelo. — (marto) Soldato, interesa rakonto daŭrigota. — Fino de la « Morto de Martino, la Paŝisto.. — « Arabaĵo ». — Diversaĵoj. — Dekkvinaŭgusta Ordenito, (de A. Daudet) esp. A. Baissac, (fino).

Svisa Espero. (marto). — Svisa kroniko. — La Komitato de l'S. E. S. petas al ĉiuj grupoj de Sirŝlando helpi la organizan Komitaton de l'dua Kongreso en Genevo.

La Esperanta Studento Ĉiumonata ilustrita gazeto Redaktata de F-ino C. Oxenford. (jarabono 2 fr.)

La fizionomiisto, de R. Dimsdale Stoker. « Palabrunaj okuloj montras agrablan, ŝanĝeblan, ameban naturon, al kiu mankas nek inteligenteco nek rapida humoro. — Flavaj okuloj estas emblemoj de akra cerbo.. Bluaj okuloj estas signoj de tre aminda, kapitulaca humoro, kaj kelkaj fizionomiistoj pensas ke bluaj okuloj montras inklinon por babilado » — Redaktora babilado de C. Oxenford. — Pri Meksiklando, kun ilustraĵo de E. Guerra. — La ponto de l'Diablo, ilustrita de F-ino Oxenford. — La Fratoj de Mowgli, C. Oxenford. — La Influo, de l'vestoj (F-ino A. L. Sim), kun ilustraĵoj de C. O. — Amerika juĝado (L. Rigoir). La Kristikisto.

Esperanto-Jurnalo. Ni povas anonci ke de nun « Esperanto » estas propraĵo de akcia societo. La administranto S-o. P. Berthelot, ne plu loĝas en Ceret. Lia adreso estas, CASE CENTRALE, EN GENÈVE (Svisujo). La Societo supredirita ĉiam aperigos « Esperanto'n, » malgraŭ la malfavoraj ventoj kiuj povos blovi kontraŭ ĝi.

PRI « HOMARANISMO » AŬ « HILELISMO »

En *Ruslanda Esperantisto* januara aperis kurioza artikolo pri *Dogmoj de Hilelismo*. En la februara numero de l'sama gazeto oni reparolis pri tiu temo. Fine, kiel ni raportis en E. K. aprila (p. 62), la verko estis publikigata en broŝuro kun titolo *Homaranismo*, sen nomo de aŭtoro.

Ni ne povas citi la tutan broŝuron. Jen la *principoj* de homaranismo :

« La homaranismo estas celado al pura homeco kaj absoluta intergenta justeco kaj egaleco... »

« La homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiano, donas al li la eblecon evitiĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale-homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco.

« La homaranoj esperas, ke per konstanta reciproka komunikiĝado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj, la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon, sed tio ĉi fariĝados iom post iom, nerimarkate kaj sen ia rompado. »

El la *dogmoj* de homarano ni eltiras nur parton de la 10-a regulo, pri religio

«... Kiel fundamentan leĝon de mia religio mi rigardas la regulon : « agu kun aliaj tiel kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco » ; ĉion alian en mia religio mi rigardas nur kiel legendojn aŭ kiel religiajn *morojn*, kiuj estas enkondukitaj de homoj, por enporti en la vivon, difinitan programon kaj spiritan varmon, kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de mia persona deziro.

« Mi konscias, ke ĉiu homo apartenas al tiu aŭ alia tradicia religio, ne tial ke ĝi la plej multe respondas al liaj personaj konvinkoj, sed nur tial, ke li en ĝi naskiĝis, kaj ke la esenco de ĉiuj religioj estas la sama, kaj ili distingiĝas unu de alia nur per legendoj kaj moroj, kiuj ne dependas de persona elekto de homo. »

Nun antaŭ ol kritiki tiun « *novan religion* », ni devas konstati ke ĝi ne estis tre favore ricevita de kelkaj gazetoj esperantistaj, *pro la danĝerigo konfuzigi, ĉe la ne-Esperantistoj, ESPERANTISMON kaj HOMORANISMON.* (1)

Certe katolikoj, se ili facile konsentos pri la idealo aŭ celado de Homaranismo, ne povas akcepti la « dogmojn ». Oni ne estus

(1) Vidu *L'Esperantiste* de marto, p. 65-66-67.

plu katolika, se oni kredus ke, aparte de l'regulo morala « agu kun aliaj, ktp. » ĉio en religio estas « *nur legendoj aŭ reliqiaj moroj enkondukitaj de homoj* », kaj povas estis laŭvole obeita aŭ ne !

Fakte neniu katoliko povas esti Homarano, sen ke li forlasu sian religion. Vi kredas, Sinjoro Homarano, ke viaj dogmoj estas « la Vero absoluta, ĉiuloka kaj ĉiutempa, la sola politika-religia idealo » (p. 6-a de la broŝuro) ! Kial tiuj dogmoj de Homaranismo estus por mi pli devigaj ol la dogmoj de mia religio, — kiun (mi ĉi okaze proklamas) mi praktikas kaj kredas ne nur tial ke mi naskiĝis en ĝi, sed tial ke mi, homiĝinta, ĝin studadis dum longaj jaroj kaj plene konvinkiĝis pri ĝia « absoluta vereco » ! Kia estas via aŭtoritato por certigi al mi ke viaj dogmoj estas la « Vero absoluta » !

Neniu homo, *kiel homo*, havas rajton trudi al ceteraj homoj ion ajn. La dogmojn de mia religio mi kredas nur tial, ke *Dio* ilin trudas al mi, kaj ne *homo*.

Kredu al mi, Sinjoro Homarano, por krei « novan religion » oni bezonas alion ol kelkaj cirkuleroj kaj raciaj principoj ! Ĉu vi vere pensas, ke *homo* ajn povas krei religion ?

Por fini ni citos parton de la bela artikolo de nia eminenta kunlaboranto, P-o Dombrovski, en *Ruslanda Esperantisto* marta : »

« Laŭ nia opinio, la fina celo de Hilelismo, nome la unueco kaj unuiĝo de ĉiuj nacioj estas idealo bela, sed *tre malnova*. La unua homo, kiu ĝin klare esprimis estis efektive « palestina saĝulo », tamen ne Hillel'o, sed Jesuo-Kristo. Kiu deziras pri tio konvinkiĝi, volu legi la Joanan Evangelion, kie en XVII, 21, li trovos ne sole la principon de universala unueco : « *ut omnes unum sint* : — por ke ĉiuj estu unu », sed ankaŭ la profetaĵon pri la efektiviĝo de tiu ĉi principo : « kaj estos unu ŝafaro kaj unu paŝtato » (X. 16). El tiu ĉi kaŭzo la kristanaro ĉiam profesis tiun ĉi idealon, kvankam ne povis ĝin efektivigi ĝis nun. — Ne povis do ne el manko *de scio pri tiu idealo*, sed el manko de *bona volo* : tiel same, kiel el manko de *moralaj fortoj* la tuta homaro ne povis ĝis nun forigi la militojn naciajn, la reciprokajn persekutadojn, ktp. ».

Profesoro E. LIME.

DUA UNIVERSALA KONGRESO

Sub la prezido de D-ro Zamenhof en Ĝenevo.

— (de la 28-a de Aŭgusto ĝis la 6-a de Septembro 1906) —

PROGRAMO DE L'KONGRESO

Mardon 28 Aŭgusto, vespere. Oficiala Malferma Ceremonio kaj Koncerto *Merkredon 29* matene Preparaj Kunvenoj; posttagmeze: I-a Ĝenerala Kunveno; vespere Teatra Vesperfesto. *Ĵaŭdon 30*: Ŝipveturado sur la Lemana Lago, kun oficiala Festeno en Vevey (Festenkarto: 5 frankoj). *Vendredon 31*, matene: 2-a ĝenerala Kunveno; posttagmeze Akcepto ĉe l'Parke de S-roj Thudicum, en "La Châtelaine". vespere Balo. *Sabaton 1 Septembro* posttagmeze 3-a ĝenerala Kunveno; vespere Oficiala Ferma Ceremonio kaj Koncerto. 3, 4, 5, *Septembro*; Vojaĝo tra Svisujo: Ĝenevo, Montreux-Oberland, Spiez, Interlaken, Mürren, Berne, Ĝeneve.

Verda karto (Fr. 10). Oni de nun povas aĉeti la oficialan kongreskarton kiu kostas 10 frankojn kaj donas rajton senpage ĉeesti kaj voĉdoni en ĉiuj kunvenoj de la kongreso, partopreni je ĉiuj festoj (ankaŭ je la ŝipveturado sur la lago), ricevi ĉiujn dokumentojn por la diskutoj kaj laboroj de l'kongreso kaj la adresaron de l'kongresanoj.

Blanka Karto (Fr. 5). Ĉiu persono jam posedanta 10-frankan *verdan karton* havos rajton aĉeti por la anoj de sia familio unu, du, tri aŭ maksimume, kvar blankajn kartojn, kiuj kostas Fr. 5, kaj donas samajn rajtojn kiel la verdaj kartoj, esceptinte la rajton voĉdoni kaj ricevi dokumentojn kaj adresaron.

EKSPOZICIO

Granda ekspozicio estas organizata, ĉiuj esperantistaj grupoj estas petataj sendi kiel eble plej multajn dokumentojn al la kongresa oficejo. Specialan cirkuleron petu la interesatoj.

ALIĜOJN, MONON, KORESPONDAĴOJN K. T. P., UNUVORTE ĈION,
KIO KONCERNAS LA KONGRESON ONI SENDU NUR AL LA
KONGRESA OFICEJO, 15 QUAI DE L'ILE, GENÈVE.

NOTETOJ.

Tra la Mondo, per cirkulero al ni sendita, sciigas ke ĝi komencis seriojn da internaciaj enketoj per *Demandaro* pri la instruado en la tuta Mondo. La celo de tiu ĉi enketo estas : la varbado de profesoroj kaj geinstruistoj al Esperanto, kaj per ili de gejunuloj. — Ĉiuj samideanoj diversnaciaj ne timu respondi al tiu ĉi alvoko ! Sendu viajn dokumentojn kaj ilustraĵojn pri la instruado, al la direktoro de Tra la Mondo, 15 B-d des 2-Gares, Meudon. — (Francujo).

Esperanta Ligilo : monata revuo. Por ĉiu lando 3 fr. Direktoro ; Th. Cart. 12 rue Soufflot, Paris (Franc.) Tria jaro, 1906. — N-o 4-a (Aprilo) Enhavo : Novaj abonintoj. — Problemo. — Interparolado, vizito. — Proverboj. — Esperanta kroniko, de Thilander. — Poezio : PLUVATAGO, de Grabowski. — Humoraĵo. — Felietono : Perdita kaj retrovita, de S-o Boirac.

Bohema sekcio de aŭstria ekspozicio en Londono.
Sekvantan raporton ni ricevis :

En aŭstria ekspozicio industria, kiu estas aranĝota en mezo de jaro 1906 en London, estos reprezentata kiel memstara parto ankaŭ regno Bohemujo per aparta sekcio, kiu troviĝas sub aŭspicioj de reĝa ĉefurbo Praĥa kaj sub honora prezidado de grafo Lützow kaj de urbestro de Praĥa dr. Vladimír Srb. Ĉi tiu sekcio montros rezultatojn de celadoj de loĝantaro en ĉi tiu regno.

Atentigota je belecoj de Bohemujo per serio de dioramaj imaĝoj kaj vidaĵoj elmontrantaj pli signifajn lokojn kaj konstruaĵojn de reĝa ĉefurbo Praĥa : reĝan kastelon kun katedralo, urbestrejon de Staré Město /: Malnova urbo :/, urbestrejon de Nové Město /: Nova Urbo :/, preĝejon de Tyn ; k. a., poste la belecojn de la arbaroj de Ŝumava, pentrindajn kastelojn Zvíkov, Karlův Tyn /: Karlstein :/, historiajn kaj memorindajn urbojn Tabor, Kutna Hora, Krumlov k. a. Samloke oni povos vidi valorajn memoraĵojn el forta bohema movado reformacia kaj humanista /: en XV-a, kaj XVI-a. jarcentoj :/, precipe la originalajn verkojn de Majstro Jan Hus, T. Štíny, P. Chelčický. Krom tio oni renkontos en la bohema ekspozicio elmontraĵojn de popolarto kun diversaj brodaĵoj, kostumoj naciaj, k. t, p.

Akademi internasional de lingu universal. — Cirku-
leryo enhavanta tabelon de vortoj faritaj per mezmetitaj sufiksoj.

Espero Kataluna. Ni kore sendas nian koran amikan man-
premon al la Juna Barcelona esperant. Societo. — La sociala si-
dejo estas ĉe : S-o Johano Rasals, prezidanto, Calle Puerta Ferrisa
30, Liberia, Barcelona. — La nova grupo petas por propagando,
ke oni bonvolu sendi al la prezidanto ĉion kion oni konsideras
utila por ĝia afero, (t. e. poŝtkartojn, *revuojn*, unuvorte propa-
gandilojn.) Ni esperas ke niaj legantoj helpos korege la Junan
Societon per iliaj konsiloj kaj sendoj.

Imperiosa Civitas. — *Roma Esperantista Societo*, sciigas
ke la sidejo de tiu societo estas malfermata ĉiumarde de la 7-a
ĝis la 10-a horo vespere. Ĉiuj esperantistoj, precipe la fremdu-
loj kiuj vizitas Romon, estos tutkore akceptataj.

Esperanto Club de Plymouth. (Anglujo) La esperantistoj
de Plimouth kunvenis en ilia « *Unu jara Kunveno* » en la
« *Bedford Hall* ». S-o Cecil Wade estis elektata prezidanto.
Post kelkaj paroladoj de S-oj C. Wade kaj Rev. W. E. Wad-
digton pri Esperanto, okazis ĉarma koncerto. Niajn gratuladojn
al S-o J. Thill kaj al liaj kunhelpintoj pro ilia bona ideo propa-
gandi tiele Esperanton en Anglujo.

Ekspozicio en SUMEN (Bulgarujo). — La grupo Su-
mena « *VEKIĜO* » organizas ekspozicion. Ĝi petas ke ĉiu grupo
aŭ esperantisto partoprenu almenaŭ per albumoj de ilustritaj
kartoj, broŝuroj, lernolibroj, revuoj kaj gazetoj, k. c..
La objektoj resendotaj devos esti markitaj per la litero « R » kaj
ladonacitaj per la litero « D ».

Cindrulino, (N-o 2-a de la biblioteko eldonita de E. K.) —
Poŝlibreto presita sur luksa papero kaj enhavanta ses ilustritajn
traĵojn. Ni rekomendas varmege tiun rakonteton ĉar, kiel Espe-
rantisto ĝuste diris : « Legi rakonton kiun jam oni scias, estas bona
ilo por plibonigi la stilon ». — « *Cindrulino* » kostas nur : 0 fr.50
afrankite ; kaj, kun la numero 1-a « *Kato* » : 0 fr, 75 ambaŭ
afrankite. — Aĉetebloj ĉe E. K.

BIBLIOGRAFIO

Les mots esperanto groupés d'après le sens. de M. Bodin. — Tiu libreto estos tre utila por facile kaj rapide lerni multaj vortojn. Ĝi estas dividita en 20 ĉapitroj, ĉiu pri speciala objekto. — La vortoj estas prezentataj sub ilia gramatika formo la plej uzata. L'aŭtoro aldonis ankaŭ tabelon de la vortoj, kiujn oni povus facile konfuzi en interparolado. La libro enhavas 128 paĝ. kaj estas aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo. —

Elementa fotografa optiko, de Karlo Verks — (Presa Esperantista Societo). — S-o Karlo Verks proponas en sia verko, konigi al ĉiuj, kiuj bonvolos dediĉi al ĝi iom da atento, kial ili ne sukcesas en la fotografarto kaj kiel ili devas labori por certe sukcesi. La verketo estas dividita en 7 ĉapitroj; la ses unuaj pri la lensoj kaj objektivoj, ĉar laŭ S-o Verks, la plej bona maniero por fari sukcese fotografaĵojn estas bone koni la objektivojn. — La lasta ĉapitro raportas pri diversaj *praktikaj* formuloj. Fotografa vortaro sekvas. Ĉiuj nemetiistoj de la fotografarto volos posedi tiun ilustritan libreton.

Clef du radikaro (ĉe Presa Esperantista Societo). Donas la francan tradukon de l'Radikaro de Th. Cart. En ĝi troviĝas ankaŭ korektaĵoj pri la esperanta teksto de l'Radikaro. Certe la posedantoj de l'Radikaro aĉetos ĝian « ŝlosilon. »

Mallumaĵoj (ĉe Presa Esperantista Societo. — 43 p.-0 fr. 60) La tradukinto de tiu hungara Rakonto, S-o Lengyel Pal nin promeniĝas tra interesaj epizodoj tre bonstila kaj ĉarme skribitaj.

Kvarvoĉaj kantoj por Esperantistoj. — (Eldono de la Brita Esperantista Asocio, 13 Arundel street, Strand, LONDON, Anglujo,) N-o 1-a kostas nur 0 f. 60. — Tiuj ĉi kantoj, komponitaj de S-o Arthur Trickett, estas ĉiuj elektitaj el la «Fundamenta Krestomatio»

Enhavo de la 1-a kajero: Anĝelo. — Kanto de l'Ligo. — La malliberulo, poezio de P-o Dombrovski. — Al la reĝo. — Sonoriloj de Vespero kaj la Espero.

Albumo de konataj Esperantistoj — (Eldonita de S-o Fritz Shuck, Braunschweig). Ĉiuj, kiuj deziras koni la por-

tretojn de la plej konataj Esperantistoj devos aĉeti tiun albumon tre lukse presitansur bela kaj glatigita papero. Unue S-o F. Shuck prezentas la esperantistojn per mallonga antaŭparolo. Poste sekvas la portretoj, kiuj estas vere tre bone presitaj. Inter ili oni povas vidi, kun tiuj de la plej fervoraj kunlaborantoj de E. K. tiun de nia Direktoro. S-o P-o Em. Peltier.

L'albumo de S-o F. Schuck estas aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K. po 2 fr. 30, ne afrankite.

Plena verkaro de V N. Devjatnin (libro dua). La unua libro jam kronikita, estis eldonita ĉe firmo Hachette, kaj tiu eldono dua estas de D. P. Vejsbrut, S. Peturburgo. En ĝi troviĝas : Edziĝo, komedio en tri aktoj. — Arthuro, rakonto. — Ludilo de sorto, rak. en versoj. — Episkopo, drama skizo. — kaj la versa traduko de POLTAVO de A. Puŝkin.

Ni tre varme rekomendas legi la verkojn de S o Devjatnin, ĉar ili estas tre bonstilaj. —

Vocabulario Italiano Esperanto, de Luigi Giambene. — (Eldonita de la Libreria Internazionale, ROMA. Italujo, Tiu poŝvortaro da 96 paĝoj, (prezo. 1 liro 25.) estas l'unua presita en Italujo. La aŭtoro en ĝi presigis la ĉiutage uzatajn vortojn. La verketo malfermiĝas per simpla gramatiko de Esperanto. Ĝi fermiĝas per aldono enhavanta diversajn dokumentojn, pri la Societoj en Italujo, kc. k. c. — Ni tre gratuias P-on Luigi Giambene, la sindonema fondinto de la grupo Roma « *Imperiosa Civitas* », pro lia verko. Per ĝi multe progresados l'afero esperanta en Italujo.

Parolado pri la metodo, de Descarte (Tradukis D-o Noel.) Ni ne bezonas prezenti D-on Noel. Li estas sufiĉe konata per tiaj « Rolandkanto », « Ĉielokaj Tero » k. t. p. La « *Parolado pri la Metodo* » malfermiĝas per antaŭparolo de P-ro Thiaucourt. Jen kelkaj linioj de tiu antaŭparolo « Tiu ĉi traduko « de *Discours de la méthode*, konvinkos, mi tion esperas, tiujn « kiuj rifuzis al la helpa internacia lingvo la rajton plenumi rolon « literaturan....

« Ni tradukis « *Discours de la méthode* » pro la graveco de « la ideoj, kiun oni trovas en ĝi. Ni citos nur du el tiuj ideoj :

« Ĉu ne komencas, Descarte dirante al ni « Nenio estas inter
 « homoj pli ĝuste disdonita ol saĝo ». Tie ĉi enteniĝas de la
 « fundamento de la Demokratio t. e. la natura egaleco. Sed tiu
 « ĉi oni devas ĝuste kompreni. Egaleco ekzistas ne age, sed nur
 « ige ; se oni volas ke ĝi ekzistu *hic et nunc*, oni falas en utopion,
 « mensongajon de Socialismo, kiel elmontris tion ĉi pozitivis-
 « to P. Laffitte.» Ĉiuj kiuj pensas, devos aĉeti la tradukon de Dis-
 cours de la Méthode. Ĝi estas aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K.

La Kronikisto,

R. AŬBIN.

MONOFEROJ POR E. K.

S-oj Billard de Veaux (Toulouse) 6 fr. — Anonimo : 10 fr.
 P-oA. Dombrovski : 5 fr. — S-o Jadeau (Mercurey) 1 fr. = 22 fr.

Antaŭaj donacoj : 449 + 22 = 471 fr.

Restanta Ŝuldo 700 : — 471 = 229 fr.

Oni kredeble iom forgesis la... malplenecon de nia kaso,
 tiun ĉi lastan monaton. Ĉu ne troviĝas en la katolika Esperantis-
 taro iaj bonkoraj, malavaraj riĉuloj kiuj malaperigos tiun ma-
 lagrablan rubrikon : *Monoferoj !*

ABONMONOJ RICEVITAJ.

Plenan abonmonon ni ricevis de :

P. Blaise, Paris. — Velaine, St Quentin. — L. Polard, Paris, —
 Marcos Lliro, Sabadell, (Hisp.). — Billard de Veaux, Toulouse.
 (Ricevita de S-o Ivanov (Voronej) : 5 fr. — J. Wimmer, Eggkam

— Plenigitaj abonoj de :

S-oj : Paranty, Audinghem. — Josef Kuyda, Warszawa. —
 TH. Cart, Paris. — F-ino Roux, Saumur. — F-ino Allin,
 Mazières. — P-ro Meazzini, Arezzo (Kaj plie 7.50 Kies
 difino ne estas kalarigita.)

CU NAPOLEONO I-a ESTIS KREDANTO ?

S-o Frederiko Masson tiel konkludas en " *LE GAULOIS* " studon pri tiu demando :

Napoleono, dum lia vivado sur la ŝtonego kie li mortis antaŭtempe, kaj kie neniu el estroj de la sankta ligo pensis doni al li religiajn helpojn, Napoleono mem petis, ke oni sendu al li pastroj laŭ sia religio. Li ja konstatis kiel nesufiĉaj por tiu ofico estis la pastroj elektitaj de kardinalo Fesch, en cirkonstancoj poste dirotaj. Li mem ankaŭ petegis de Ludoviko XVIII, francan pastron, kun kiu li povus interparoli kaj kiu donus al li efikan helpon je l'momento de la granda foriro. Li mem same, tial ke la atendita pastro ne venis, (Episkopo de Quelen estis sin proponinta kaj la pastro Deguerry estis elektita), venigis, dum plene konscio, la Korsan pastron Vignali kiu, sola, iĝis en Sankta-Heleno Insulo, kaj konfesis al li kaj per li komuniĝis.

Per tio montriĝas efika kaj karakteriza volo, kiu ne permesas dubon kaj devigas jesi : « *Vere, Napoleono estis Kredanto* ».

R. AUBIN, el Tours.

ŜAKOJ

(Sub la redakcio de S-o J. Ellis, El (Keighley) Anglujo)
LECIONO VI. — Ludo specimena.

Kiu komencos ? Tion oni decidas aŭ interkonsente aŭ lote ; kaj la lotgajninto direktas la blankan pecaron, ĉar B estas ĉiam la unuamovanto. Poste, ĉiu movas alterne.

B havas la elekton el 20 iroj, t. e. 16 soldataj iroj kaj 2 per ĉiu Ĉ. Preskaŭ senescepte oni komencas per iro de S R aŭ S D, ĉar tiel vi plejbone liberigas viajn pecojn. Supozu do :

BLANKO NIGRO
1. S — 4 R 1. S — 4 R

T-e. ĉiu ludanto irigas la S-on antaŭ sia R al la 4-a kv. en la linio, kie staras sia R. Oni povas indiferekte skribi S—R4 aŭ S—4R. Ne skribu nenecesajn mallongigaĵojn ; estas senutile skribi RS al 4 R ĉar nenia soldato krom la reĝa povas iri tien.

2. Ĉ — 3 KR.

Tuj atakas la S-on. Ordinare oni malvolvas (malfaldas, postenas) ĉe loko bona por atakado kaj defendado Ĉ-on plifruo ol K-on. Ĉ staras plibone sur 3 KR ol sur 3 TR, ĉar tie ĝi regas pliajn kv-ojn.

..... 2. S — 3 D
Tiun-ĉi oni nomas defendo de Fildor, glora franca ludisto, kiu ĝin tre ŝatis. Sed 2... Ĉ-3 KD estas reale plibona protekto por la S, ĉar per tio N ne enfermas sian RK-on.

BLANKO NIGRO

3. K — 4 K.

Atakas la RKS-on, la malplej-fortan punkton. Tiu S estas nun protektata nur de R ; se B ĝin atakas per alia peco, N devas ankaŭ movi alian pecon por ĝin defendi ; se ne, li ĝin perdos.

..... 3. Ĉ — 3 KR.
Atakas B S-on, sed plibone estas K—2 R.

4. S — 3 D

Defendas la S-on ; sed B devis irigi Ĉ-on al 5 ĈR, kun duobla celo, defendi sian S-on kaj duoble ataki RKS-on de N.

..... 4. K — 5 Ĉ
Nun se Birigas sian RĈ-on li perdos sian D-on. Proksimume vi povas kalkuli ke se S = 1, D = 10, T = 5, K aŭ Ĉ = 3 ; multe dependas, tamen, de la pozicio de la pecoj.

5. DĈ — 2 D.

Ĉar ĉiu Ĉ povas iri al 2 D, estas necese diri DĈ. La iro ne estas bona, ĉar ĝi enfermas la DK-on. Se N kaptos Ĉ-on per K, B povos rekapti aŭ per D aŭ per S. Tiu lasta malfermos la RĈ linion, por ke RT povu iri al RĈ 1 kaj regi la linion.

.... 5. D — 2 R.

Malbone, ĉar nun la RK nepovas iri. plibone estus Ĉ — 3 KD aŭ K 2 — R;

6. REĜSALTAS

Estas malfacile malvolvi T-ojn se ne per reĝsaltigo. Generale R, kiam ĝi s'aras sur centra linio estas malpli ŝirmata kaj pli facile atakebla

6. Ĉ — 3 KD

7. S — 3 KD

Malhelpas NĈ-on, ke ĝi antaŭeniru kaj malfermas diagonalon por sia D.

7. REĜSALTAS

Ne estas necese diri kiufanken, ĉar estas neeble reĝsalti reĝflanken. N intencas antaŭen-puŝi siajn reĝflankajn S-ojn por ataki la BR-on. Tial li unue movas sian R-on, kien ŝirmantaj S-oj ankoraŭ restas.

8. S — 3 TR

Iom plimalfortigas la R-an pozicion. Reĝsaltiginte, gardu kiel vi movas la ŝirmajn S-ojn.

.... 8. K kaptas Ĉ-on (aŭ $K \times \checkmark$ povas esti skribata).

9. D \times K.

Plibone estus Ĉ \times K por liberigi DK-on.

.... 9. S — 3 TD

Malhelpas 10. K — 5 Ĉ, sed efektive-senutila iro; ĝi malŝparas tempon. Nun estas kvazaŭ B irigas dufoje senintermanke.

10. D — 5 K ŝak

Senutila ŝako; ŝakigu nur kiam vi vidas ke per tio vi ricevos utilaĵon.

.... 10. R — 1 Ĉ

Kompreneble NR devas elŝakiĝi; tion ĉi li faras irante al iom malplidangerata loko. Se N ĉesigus la ŝakon intermetante D-on sur 2 D, B povus gajni la RKS-on de N.

Komparu la pozicion kun la figuraĵo, kiun vi trovos ĉe la komenco de la proksima leciono.


NOTO PRI PROBLEMO 6-a (en aprila E. K.) — Bedaŭrinde du preseroj igis la problemon ne solvebla.

1^e la nigra K, kiu kuŝas 1 R, devas esti 1 K R.

2^o la nigra S, kiu kuŝas 2 K R. devas esti 2 Ĉ R.

PROBLEMO 7-a (de Steleto)

NIGRO: 10 PECOJ.



BLANKO: 7 PECOJ

B. komencas kaj mortigas per la 2-a iro.

SOLVO DE PROBLEMO 5-a (de E. Westbury)

1-a iro de B estas: D. 1Ĉ.

Se N 1 T(5T) \times T	2 Ĉ — 4 Ĉ m.
Se 1 D \times T	2 D — 7Ĉ m.
Se 1 T(5R) \times T	2 D — 1TD m.
Se 1 T \times K	2 Ĉ \times S m.
Se 1 T — 6R	2 D — 1TD m.
Se 1 R — 5D	2 Ĉ — 4Ĉ (ŝak. malsirm.)
Se 1 Ĉ aŭ S iras, la m. fariĝas per Ĉ-3D.	

— Ĝuste solvis: Steleto. — Sendu la solvojn rekte al la Direktoro de E. K.

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*). — Direktoro Pastro Laberthonnière. Administracio Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara: 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!


REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono 23 fr. (En Franci. 20 fr.) 110 paĝoj monate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

L'INSTITUTEUR BELGE, semajna ĵurnalo, organo de la Federo nacia de l'komunumaj liberaj Instruistoj. Jarabono: 3 fr. 50 en Belgujo, 78, r. de l'Amitié. LA LOUVIÈRE. — Kurso pri Esperanto, de I. Savres.

IL CITTADINO ITALIANO, duonmonata gazeto en Itala lingvo, raportas pri Esperanto kaj pri L. I. Enhavas bonegajn tradukojn de D-ro Josefo Loschi, Profesoro en Valombrosa *Reĝa Instituto Forsta*. Konsistas el 16 p. Kiel *l'Esperantiste*. S-ro P-ro J. Meazzini, de Arezzo (Ital.) ricevis de la Direktoro la taskon redakti la esperantajn aferojn, artikolojn, anoncojn, bibliografiojn, ktp., kaj eĉ ricevi la abonpagojn el eksterlando (jare 3 fr. 50).

ESPERANTAJ ŜLOSILOJ, de ĈEFEC, 45, Christchurch Road, Streatham Hill, London, S. W. — Estas nun aĉeteblaj: la angla, germana, franca, itala, hispana, rusa, kaj sveda eldono, kaj riceveblaj po 3 fr. 50 la centon (100). Ĉiulandaj poŝtsignoj estas laŭ efektiva valoro akceptataj. — Je la sama adreso POŜTKARTOJ kun teksto kaj adreso de diversaj naciaj societoj esper. — Po 1 fr. 35 la centon (100).

LE COLLECTIONNEUR UNIVERSEL, Karto-Filatelisto



kaj literatura revuo. — Konkursoj kun premioj, anoncoj senpagaj por l'abonantoj. — 10.000 legantoj Jarabono 2 fr. (en Franci. 1 f. 50). Specimen. 15 centim. Direktoro Cl. Guinot, 38, r. de Chalon, Le Creuzot.



CINDRULINO, KUN SES ILUSTRAĴOJ
N-o DUA DE LA ILUSTRITA ESPERANTA BIBLIOTEKO
 por infanoj.

ĴUS APERIS : 0 fr. 50 afrankite.

KATO KUN BOTOJ kaj **CINDRULINO** kune mendataj kostos nur 0,75, afrankite.

« **TRA LA MONDO** » (*Tutmonda multilustrata recuo esperanta*). — Nuntempaĵoj; artoj, literaturo, sciencoj; komerco, industrio; militistaro, maristaro; teatro; sportoj; virina kaj gejunula paĝo; felietono; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare : 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin : 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

LINGVO INTERNACIA ESTAS NUN DUONMONATA. — Envasas 32 paĝojn. Sen literatura aldono : 5 fr. — kun literatura aldono : 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède, Paris, 5^e.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

RONDIRANTA MANUSKRIPTO, ĉiumonata, nur interpastroj katolikaj el ĉiuj landoj Eŭropaj. Partopreno senpaga. Oni povas skribi pri ĉiaj aferoj, precipe religiaj, kaj korektas reciproke la tekstojn. Tio tre utilas por plibonigi stilon esp., ellabori terminaron teologian, kc.; estas tre agrabla. Sin turni al **SERVAIS** P-ro Kat., ĉe Basilides, pl. Leopold, 7, NAMUR, Belgujo.

➤ **LE SOUVENIR**, Monato Ĵurnalo-literatura. — **BELGUJO** : 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro : **XAVIER CASIER**, Premiita de Akademio Reĝo de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ S-o, **VARJU** Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

LONDONO; **PENSIO** por gesinjoroj, Moderaj prezoj. Oni parolas k. korespondas Esperante, Angle kaj France. — S-ino **O'Connor**, Esperanto House; 17, St-Stephen's Square; London-Bayswater.